

LANDONOMOJ EN ESPERANTO

La baza sistemo

La sistemo de la landonomoj en Esperanto havas du partojn.

La unua parto:

I homo	lando
---o	---ujo
ital-o	Ital-ujo
franc-o	Franc-ujo
german-o	German-ujo
angl-o	Angl-ujo
ĉin-o	Ĉin-ujo
japan-o	Japan-ujo
egipt-o	Egipt-ujo

Ĉi tie la radiko indikas la homon, kaj necesas aldoni la finaĵon -ujo por krei la landonomon.

La dua parto:

II lando	homo
---o	---ano
Brazil-o	brazil-ano
Uson-o	uson-ano
Kolombi-o	kolombi-ano
Pakistan-o	pakistan-ano
Indonezi-o	indonezi-ano
Kenj-o	kenj-ano
Sud-Afrik-o	sud-afrik-ano

Ĉi tie la radiko indikas la landon, kaj necesas aldoni la finaĵon -ano por krei la nomon de la homo, kiu loĝas tie.

La finaĵo -lando

Sed estas problemoj! Oni povas uzi la finaĵon -lando anstataŭ -ujo. Rigardu:

I homo	lando
---o	---lando (---ujo)
pol-o	Pol-lando (Pol-ujo)
svis-o	Svis-lando (Svis-ujo)
skot-o	Skot-lando (Skot-ujo)
finn-o	Finn-lando (Finn-ujo)
dan-o	Dan-lando (Dan-ujo)

Teorie oni povus aldoni la finaĵon -lando al ĉiuj landonomoj anstataŭ -ujo (ekz. German-lando, Sved-lando ktp.) En la praktiko oni tre malofte aŭdas tiajn formojn.

Tiuj nomoj apartenas al la parto I de la sistemo. La radiko indikas la homon, kaj necesas aldoni la finaĵon -ujo aŭ -lando por krei la landonomon.

Sed rigardu la subajn ekzemplojn:

II lando	homo
---o	---ano
Irland-o	irland-ano
Island-o	island-ano
Nederland-o	nederland-ano

Tiuj nomoj apartenas al la parto II de la sistemo. La radiko indikas la landon, kaj necesas aldoni la finaĵon -ano por krei la nomon de la homo, kiu loĝas tie.

-lando ne estas finaĵo, sed estas esenca parto de la radiko, kiun oni ne povas forigi.

-ujo/-io

Multaj homoj preferas uzi la finaĵon -io anstataŭ -ujo. Ekzemple:

I homo	lando
---o	---io (---ujo)
ital-o	Ital-io (-ujo)
franc-o	Franc-io (-ujo)
german-o	German-io (-ujo)
angl-o	Angl-io (-ujo)
ĉin-o	Ĉin-io (-ujo)
japan-o	Japan-io (-ujo)
egipt-o	Egipt-io (-ujo)

Sed rigardu la subajn ekzemplojn:

II lando	homo
---o	---ano
Kolombi-o	kolombi-ano
Ĉili-o	ĉili-ano
Siri-o	siri-ano
Indonezi-o	indonezi-ano
Aŭstrali-o	aŭstrali-ano
Niĝeri-o	niĝeri-ano
Liberi-o	liberi-ano

Tiuj ekzemploj apartenas al la parto II de la sistemo. La radiko indikas la landon, kaj necesas aldoni la finaĵon -ano por krei la nomon de la homo, kiu loĝas tie.

-i- ne estas parto de la finaĵo. Ĝi estas esenca parto de la radiko, kiun oni ne povas forigi.

En tiuj ekzemploj, -io **ne** anstataŭas la finaĵon -ujo. Oni **ne** povas diri “Kolombujo”, “Ĉilujo” ktp.

Landoj kun -(i)stano

En kelkaj landonomoj, pro influo de la naciaj lingvoj, multaj homoj uzas la finaĵon -stano au -istano anstataŭ -ujo. Tiuj nomoj ĝenerale apartenas al la parto I de la sistemo.

I homo	lando
---o	---ujo/ ---(i)stano
afgan-o	Afgan-ujo/Afgan-istano
kazaĥ-o	Kazaĥ-ujo/Kazaĥ-stano
kirgiz-o	Kirgiz-ujo/Kirgiz-istano
kurd-o	Kurd-ujo/Kurd-istano
taĝik-o	Taĝik-ujo/Taĝik-istano
turkmen-o	Turkmenujo/Turkmen-istano
uzbek-o	Uzbek-ujo/Uzbek-istano

Sed estas unu tia landonomo, kiu apartenas al la parto II de la sistemo (ĉar ne ekzistas popolo, kiu nomiĝas “pakoĵ”). La finaĵo -istano estas esenca parto de la radiko, kiun oni ne povas forigi:

II lando	homo
---o	---ano
Pakistan-o	pakistan-ano

